

Usona Esperantisto № 2023:3 (maj-jun)

Anoncoj

ESF duobligas donacojn al EUSA; Stipendioj haveblas por partopreni kongresojn; Redaktoro serĉata; Special-Interest Groups

De la estraro

Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

Expense report from the CO for April and May.

Marlene

beletre • Timothy BORONCZYK

Ili havis ĉion, kion oni povus deziri. Sed Marlene komencis senti enuon kaj rankoron.

Words that end in -aŭ

language corner • Lee MILLER

-aŭ isn't a suffix. You can't add it to a root to create a new word.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La dudek-sepa en serio de Timothy BORONCZYK.

Tradukintoj tiel elastaj kiel lumbrikoj post pluvo

traduku! • Hoss FIROOZANIA

Ĉi-numere ni tradukas el la angla en Esperanton. Ni prezentas respondojn al la defio el *The Handmaid's Tale* de Margaret ATWOOD, kaj novan defion el *Kindred* de Octavia E. BUTLER.

esti

senintenca esperantaĵo • Timothy BORONCZYK

Ĉu esti aŭ ne esti? Tiel staras nun la demando.

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj.



Anoncoj

ESF matches donations to E-USA

The Esperantic Studies Foundation (ESF) has agreed to extend its matching program for donations to E-USA through 2023, up to a total of \$5000 for the year.

When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the Usona Bona Film-Festivalo and to production of the film version of the new play *1910* that was performed onstage at the UK in Montreal in August 2022. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States.

Donate today! <https://www.paypal.com/donate/?hosted_button_id=7PDRAZGYEG9E>

Stipendioj por kongresoj

Esperanto-USA volas doni stipendiojn kaj helpon por partopreni kongresojn ĉi-jare. Ĉu vi volas partopreni kongreson, sed ne certas, ĉu vi povos – aŭ pro monaj kialoj aŭ pro la manko de ia alia helpo? Kontakti nin per la subaj formularoj:

- **Universala Kongreso** <<https://forms.gle/mRomoovx2ecpPPmeA>> (UK – Torino, Italujo)
- **Internacia Junulara Kongreso** <<https://forms.gle/sfUiHy6MB6WDXzh29>> (IJK – Lignano Sabbiadoro, Italujo)
- **Tut-Amerika Kongreso de Esperanto** <<https://forms.gle/a7jqhU3gqXdaNqvn7>> (TAKE – Fortaleza-CE, Brazilo)

EUSA serĉas novan redaktoron

La nuna redaktoro de *Usona Esperantisto* esperas emeritiĝi antaŭ la fino de 2023, do Esperanto-USA serĉas novajn kandidatojn por la posteno. Nia redaktoro respondecas ne nur pri la bulteno – nia ĉefa informilo – sed ankaŭ pri la kanaloj en diversaj sociaj komunikiloj, kie ni popece disvastigas ĝiajn

anoncojn kaj artikolojn rete.

La posteno de redaktoro estos pagata laboro, kaj pri salajro ni volonte negocos. Depende de interesoj de la kandidatoj, ni pretas dividi la laboron inter teamo, aŭ rajtigi al la redaktoro komisiu iujn taskojn al helpantoj.

Kandidatoj estu spertaj parolantoj de Esperanto, prefere kun KER-diplomo je nivelo C1. Ili estu pretaj kunlabori kun kontribuantoj, ne nur por korekti kaj poluri iliajn kontribuojn, sed ankaŭ helpi progresigi la kontribuantojn mem. Finfine, oni estu preta resti fidela al la statuto de EUSA, kiu devigas neŭtralecon rilate ĉiajn aferojn religiajn, politikajn, aŭ alimaniere tendencajn, krom se ili rekte rilatas al Esperanto.

Por pli da informo, bonvolu sendi mesaĝon al <bulteno@esperanto-usa.org>.

Special Interest Groups

You may have seen Esperanto-USA's directory of local groups, which bring together speakers from different geographical regions. But did you know we also maintain a **database of special-interest groups** <https://esperanto-usa.org/groups/special_interest_groups/>?

Each "SIG" is devoted to a particular topic. Currently, we have groups that focus on games (e.g. chess, role-playing), hobbies (e.g. ham radio), and lifestyles (e.g. veganism). What's more, SIGs don't have to maintain the same sort of strict neutrality that Esperanto-USA is sworn to, so they can be devoted to political or religious topics.

Check out the database and see if there's something that interests you. We also welcome the creation of new SIGs. If you'd like to start one, please register your new group with the form on **our main groups page** <<https://ttt.esperanto-usa.org/groups/>>.

SIGs sometimes provide updates about upcoming events with a blog, a mailing list, or some other means of sending out messages to interested parties. Links to these (if the SIG has them) can be found in the respective group listings.

De la estraro

Board Meeting, May 13th, 2023

2023-05-13

Ĉeestas: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Fred MEYER III, Ruth (Margo) KEVESS-COHEN, Tim RICE, Jane SHEVSTOV, Hoss FIROOZANIA, sen voĉdonrajtoj: Vilĉjo HARRIS, Logan HALL, Charles GERMANY, Brandon SOWERS

La prezidento komencas la kunsidon. Ni havas kvorumon. Charlotte petis aldonon al la tagordo, ke la estraro diskutu oferton de volontulo, kiun ni ricevis. Laŭ la kutimo de la estraro, la protokoloj de la antaŭa kunsido jam estas akceptataj.

Raportoj

CO

La voĉdonado komencis kaj rete kaj papere, laŭ la prefero de la membroj. Ĝis nun 43 homoj jam enregistriĝis por la LK. Tio inkluzivas 2 aŭ 3 stipendiojn. La balotilo enhavas proponitajn ŝanĝojn al la regularo, sed Fred rimarkas, ke la estraro ĝis nun ne voĉdonis pri tiuj, do ni faru tion nun. La proponitaj ŝanĝoj temas pri oficialigi kelkajn regulojn, kiujn la organizaĵo ĝis nun jam uzis neoficiale pri la fondusoj. The board switches to English for financial matters and discusses further the details of this, after having previously discussed in detail on Slack. Brandon comments on the irregularity of the bylaws change being on the ballot without having been previously voted on by the board. The board has been discussing these changes for several months, and several changes have been made in accordance with that discussion.

On April 30th, after the proposals had been sent to the Central Office for placement on the ballot, Fred raised the issue that no official board vote had been set forth. Some Board members argue that there had indeed been time, that the draft proposals had been presented two months prior to both the membership and the Board for comments, and Fred had been invited to voice any concerns. Since he did not raise any concerns in a timely fashion, and all suggested edits from Board members had been incorporated without further objection, it was thought that the sole requirement of the Bylaws regarding amendment proposals (section 1203, "Amendments may be proposed by the Board") had been met.

Fred additionally expresses concern that the requirement of a unanimous Board vote for dissolving an Endowment Fund may be too strict. Others point out that the threshold is set intentionally high, since the Board is never supposed to dissolve an Endowment Fund, and donors to these restricted funds need to feel confident that their money will not be misspent. Hoss adds that, by law, when monies are solicited for an explicit purpose, we are prohibited from using them for an unrelated purpose; thus

the legal requirements are far more strict than even the new bylaws propose.

To satisfy any concerns, Margo proposes that the board vote now in support of these changes. Jane seconds. Filipino calls for the vote. The board votes unanimously in favor of these changes appearing as they already do on the ballot. It is recommended that a more formal board procedure for future amendment proposals would be desirable. Hoss agrees to write such a procedure for the new Board Handbook.

Tim Rice volunteers to review Delaware law in matters regarding the dissolution of restricted and interest-only funds. He further clarifies that when his time on the board ends, the new board can nonetheless contact him for information and opinions on such matters. Hoss, Brandon, and Alekso continue discussing the proposed bylaws changes and the procedure by which they were formed and placed onto the ballot.

Treasurer

Some convention income is now showing. Other than that, everything looks normal. Hoss has pointed out that the reports are not being archived, and David states that he will work on that. When asked what the convention income looks like compared to normal, Bill stated that it is a little lower than normal, but that may yet change.

President

Filipo discusses the things that were difficult for him when he first became president and gives some advice and information to Brandon and the other board candidates, so that they can have an idea of what sort of board they are entering into, regarding committees and other matters.

Old Business

Sci-Fi Flyer

This was done last month.

New Business

Volunteer Request

A 16 year-old member has requested to joining the (currently non-existent) diversity committee and project committee. The question is, do we have her start these, or do we give her something else to do with the promise that we will start these new committees when the new board starts. Brandon suggests that it is a great initiative, and that the LK is a great opportunity to build the initiative and build up these teams. Charlotte will email the volunteer and recommend that she talk to the volunteer coordinator and that she attend the LK, where we can work on forming these two committees and giving them a chance to get

started. Bill agrees to send Charlotte the section of the LK contract that deals with minors in order to determine how this volunteer could participate in the LK.

Conclusion

Filipo clarifies the end-of-meeting and post-meeting procedures for the incoming board members. Alekso requests that we discuss in Slack regarding the Film Festival, which should start on June 1, in order to allow it to be ongoing during NASK and LK. He is requesting permission that, if he runs the Film Festival, he will be allowed to run it even when he is no longer a board member and permission to make this a single film festival for the year.

Board Meeting, June 10th, 2023

Ĉeestas: Filipino DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Margo KEVESS-COHEN, Jane SHEVTSOV, Tim RICE, sen voĉdonrajtoj: Vilĉjo HARRIS, Quintyn BOBB, Brandon SOWERS, Logan HALL

Meeting is called to order. A quorum is declared, in addition to the introduction of the current candidates for board. As an update to the agenda, Jane confirms that the second item on the list of farendaj agadoj is completed. Phil confirms that the minutes of the previous meeting were posted online and approved via our automatic minute approval process, by which the secretary posts the minutes via Google Docs where all board members can see, and board members have a few days to read them and submit any changes before they are automatically approved.

Standing Reports

CO

Little to report. Bill is handling matters with Salesforce and the Landa Kongreso.

Treasurer

The treasurer displays the draft budget to all present, in addition to having sent it to all Board members and candidates via email and Slack, for review. The budget is based on the last three years, using best estimates concerning investments. It is mentioned that the “2023 Extrapolated” column is more useful for some items than for others, as it assumes that the rate of income and expense for a given line item will remain the same across all months. This is not true for items such as member dues and donations, which are heavier at the end of the year, and for items such as Convention income and expense which are highly variable throughout the year based on the needs of the LKK. It is common practice to assume that the Convention will have as much income as expense, as this is a goal of the LKK. The board discusses the need for an organizational Zoom account as well as trying to clarify where the expenses came from to reserve rooms during the 2022 UK for hosting our LK at that time. The board agrees

on \$500 as a line item for software subscriptions, to be included as its own line item and account, with the understanding that we may spend much less than this due to non-profit discounts that many companies offer. A discussion arises regarding the costs of paper bulletins and how to account for those, and the board decides to bring this up to the membership at the LK. A discussion arises regarding a possible donation campaign and/or membership campaign. Charlotte comments that the \$897 deficit appears to be well within the margin of error based on how our investments do.

Alex asks about the promoting Esperanto line item. David clarifies that this is there to represent the \$500 budget that was agreed upon at the last LK, and that none of this has yet been spent out of the General Fund. Ruth clarifies that the board approved for the Promotional Committee to spend \$200 on fliers about Esperanto for a sci-fi convention, but the convention was then cancelled until September, so that \$200 may be spent by the committee at that time. Jane recommends that we shop around for a better price on DNO insurance. Alex suggests putting something fun in people’s goody bags in Raleigh to advertise Esperanto. Ruth suggests that this could be something to give away in public events. Brandon suggests a postcard that could be sent to people. This discussion will continue in Slack.

Alex suggests that the budget looks as good as we can probably get it, given that we do not have the time or energy to do a deep dive on each line item and best deals. Charlotte comments again that the total number seems within the margin of error for benign as close as we reasonably can come to breaking even while also following best practices concerning budgeting for higher expenses than what may possibly end up, rather than budgeting for too little. Brandon suggests that we may be overdue for a membership dues increase, given that it has not increased in over 15 years despite inflation. Tim proposed accepting the budget. Jane seconds. Phil checks for further discussion then calls for the vote. Unanimously approved. The motion passes, and the board will present this budget to the members at LK in July. David is asked about the other reports and states nothing to add but opens the floor to questions. Phil comments that if there ever are any surprises or major issues, that the board would know about it before our monthly meeting and that asking about anything unusual is mainly a formality.

President’s Report

Phil has sent the report out to the board and asks that the board review it and suggest any needed changes before the LK.

Old Business

Alex asks to confirm that everyone is fine with the film festival plans he had suggested in Slack. The board agrees. The plan, in summary, is to set certain dates and to have only one film festival this year instead of two, with the prize money doubled in order to attract more talent, especially

given the ongoing writer's strike. Alex requests, during the initial opening party for the film festival, for money for pizza and perhaps sodas while bringing together professional actors with local Esperantists to help build up hype for the film festival and encourage collaboration between Esperantistoj and professionals in the film

community, as a part of spreading Esperanto while also encouraging the creation of more cultural material in Esperanto. Charlotte agrees, as chair of the Goldman Fund, that they can reimburse him these expenses out of that fund.

The meeting is called to a close.

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <https://bit.ly/3LzLLK> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2023-04-05	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2023-04-12	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2023-04-12	Federal & State Payroll Taxes	695	Salaries	Employee taxes
2023-04-12	HARRISWB	1736	Salaries	payroll
2023-04-14	ADP	62	Payroll Fees	fees
2023-04-14	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2023-04-19	UEA-V	8000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 7254.74 EUR
2023-04-26	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost
2023-04-26	BOA CC 7572	20	Internet Access	ttt website (VULTR.COM) (March)
2023-04-26	BOA CC 7572	39	Miscellaneous Expenses	adjustment
2023-04-26	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2023-04-26	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow (March)
2023-04-26	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2023-04-26	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number (March)
2023-04-26	BOA CC 7572	395	Internet Access	Dreamhost March)
2023-04-28	Burton, Charlotte	200	Goldman Fund Expenses	stipend for landa kongreso 2023
2023-04-30	PAYPAL	197	Credit Card Expenses	Fees
2023-04-03	UEA-V	163	CATW Expenses	Donation to Infanoj Cxirkau la Mondo
2023-05-08	WILLIAM PEACE UNIVERSITY	7755	E-USA Convention Expenses	May 1st progress payment #94359
2023-05-09	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2023-05-12	ADP	62	Payroll Fees	fees
2023-05-15	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2023-05-15	Federal & State Payroll Taxes	695	Salaries	Employee taxes
2023-05-15	HARRISWB	1736	Salaries	payroll
2023-05-16	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2023-05-19	Rockliff, Mara	190	Goldman Fund Expenses	Reimbursement for flight to congress
2023-05-26	Burton, Charlotte	447	Goldman Fund Expenses	stipend for travel to landa kongreso 2023
2023-05-11	ONLINELABELS	18	Member Mailing Expenses	labels for various mailings
2023-05-15	RSYNCH.NET	207	Office Expenses for backup	Backup for 2 years
2023-05-18	Rockliff, Mara	190	Goldman Fund Expenses	Reimbursement for flight for Cassidy Walker
2023-05-31	PAYPAL	170	Credit Card Expenses	Fees

Marlene

beletre • Timothy BORONCZYK

En la mara profundo vivis paro da fiŝoj, kiuj estis geedziĝintaj dum pluraj jaroj. Ili havis ĉion, kion oni povus deziri: komfortan maranemonon por loĝejo, marherbojn por ornamo, kaj gregon da gupioj por amuzo. Sed, kiel ofte okazas en longdaŭraj rilatoj, la edzino Marlene komencis senti enuon kaj rankoron. Ŝia edzo Laŭrenco estis bona provizanto, sed mankis al li la ĉarmo kaj la ambicio, kiujn ŝi sopiris. Tiam Marlene rimarkis Finn-on, impetan kaj aventureman fiŝon, kiu ĉiam rakontis la plej ekscitajn historiojn pri siaj vojaĝoj.

Dum Laŭrenco pigre naĝis ĉirkaŭ la anemono, Marlene pensis, ke se Laŭrenco mortos, ŝi povos ricevi grandan monsumon pro vivasekuro, kaj komenci novan vivon kun Finn. La plano ŝajnis nefuŝebla – ŝi forlogos Laŭrencon al loko, kie ĉeestas fiŝkaptistoj, kaj ŝi certigos, ke li estu kaptita per hoko.

Unue Marlene devis konvinki al Laŭrenco kontrakti vivasekuron. Ŝi rolis simpatie, dirante kiel respondema kaj zorgema li estas pri la estonteco. Laŭrenco, kiu neniam antaŭe aŭdis pri vivasekuro, feliĉis, ke li povos zorgi pri Marlene eĉ post sia forpaso. Kompreneble Marlene elektis la plej multekostan kontrakton.

Tiam Marlene serĉis en la ĉirkaŭaĵo lokon taŭgan por la murdo. Ŝi elektis koralrifon konatan pro sia abundo da fiŝoj kaj ofta ĉeesto de fiŝkaptistoj. Kaj ŝi atendis tagon, en kiu la akvo estis netravedebla, por certigi, ke neniu vidos ilin.

Finfine la murdotago alvenis. Marlene konvinkis Laŭrencon, ke ili naĝu kune. Rolante kiel dolĉa edzino, ŝi diris, ke ŝi deziras pasigi iom da tempo kun li romantike. Laŭrenco, ĉiam plaĉivola, konsentis sen hezito.

Marlene gvidis Laŭrencon al la rifo, mensogante, ke ŝi volas montri al li novan specon de marherbo. Laŭrenco suspektis nenion, kaj sekvis ŝin. Kiam ili atingis la lokon, Marlene tuj puŝis Laŭrencon al flosanta fiŝhoko, sciante, ke li estos kaptita.


Dum ŝi rigardis la forkapton de Laŭrenco, Marlene sentis triumfon. Ŝi sukcesis! Baldaŭ ŝi estos riĉa kaj kun Finn!

Pasis tagoj, kaj Marlene komencis senti la mankon de Laŭrenco kaj lia dolĉa voĉo. Kaj pli malbone, la asekura firmao rifuzis pagi. Oni diris, ke necesas fari enketon, ĉar la morto estas suspektinda.

Marlene naĝis de unu oficejo al alia, provante konvinki la firmaon, ke la morto estis akcidento. Ŝi eĉ dungis advokaton, kiu promesis helpi. Sed ju pli ŝi provis kaŝi siajn agojn, des pli suspektinde ŝi aspektis. Fine, la asekura firmao malakceptis ŝian peton, kaj Marlene restis kun nenio krom kulposento kaj ruinigita reputacio.

Marlene provis konsoli sin per la akompano de Finn. Tamen la kulposento forte pezis sur ŝi, kaj Finn baldaŭ komprenis, ke ŝi ne estas la senzorga kaj aventurema kunulino, kiun li imagis. Marlene ne povis eskapi la ombbron de sia historio, kaj eĉ Finn post iom da tempo foriris, lasante ŝin alfronti sole sian kulpon kaj bedaŭron.

Marlene pasigis la reston de sia vivo naĝante tra la vasta maro, serĉante manierojn por kompensi tion, kion ŝi faris. Ŝi dediĉis sin al helpado de aliaj fiŝoj, esperante, ke bonaj agoj iel helpos al ŝi trovi pacon. Sed la memoro de Laŭrenco daŭre turmentis ŝin, kaj la kulposento neniam foriris. Marlene komprenis, ke ŝi faris teruran eraron; ŝia avido kaj volupto koruptis ŝian juĝkapablon, kaj ŝi perdis la solan aferon, kiu vere gravas – la amon.



Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas unu el la direktoroj de Esperanto-USA, estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel

programisto.

<tboronczyk@gmail.com>

Words that end in *-aŭ*

language corner • Lee MILLER

In Esperanto, *-aŭ* isn't a suffix. It's not an ending you can add to a root to create a new word. It's just a characteristic ending for several words in Esperanto that are in different grammatical categories.

I think this is nearly a complete list of *-aŭ* words:

Prepositions:

- anstataŭ
- antaŭ
- ĉirkaŭ
- kontraŭ
- laŭ
- malgraŭ

Adverbial:

- almenaŭ
- ankaŭ
- ankoraŭ
- apenaŭ
- baldaŭ
- hieraŭ
- hodiaŭ
- kvazaŭ
- morgaŭ

- preskaŭ

Other:

- adiaŭ (*interjection*)
- ambaŭ (*adjective or pronoun*)
- aŭ (*conjunction*)
- naŭ (*number*)

The words *hieraŭ*, *hodiaŭ*, and *morgaŭ* can function either as adverbs (“Mi venos morgaŭ”) or nouns (“Morgaŭ estos bela tago, ĉu ne?”).

Because these words are complete roots, they can take additional endings. So you can have words like: *anstataŭulo*, *antaŭe*, and *hodiaŭa*.



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>

La vivo de Peĉjo

sercoj • Timothy BORONCZYK



Tradukintoj tiel elastaj kiel lumbrikoj post pluvo

traduku! • HOSS FIROOZANIA


La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj kaj komentoj.

En ĉi tiu numero ni revizitas tradukdefion el la malutopia romano *The Handmaid's Tale* (“La rakonto de la servistino”) de kanada verkisto Margaret ATWOOD. En la fikcia estonteco de ŝia romano, puĉo renversis la usonan registaron, kaj severa patriarka teokratio regas la landon. Cetere pro naturmedia krizo nur malmultaj virinoj restas naskipovaj, kaj la nova reĝimo devigas al ili – la titoldonantaj “servistinoj” – kontraŭvole naski bebojn por potencaj viroj kaj iliaj malfekundaj edzinoj.

La rakonto sekvas la spertojn de la ĉefrolulo Offred, unu el la servistinoj, prezentante la mondon de ŝia vidpunkto. En ŝiaj priskriboj de la nova socio oni trovas metaforojn pri sekso, subpremo, kaj klasdividoj. Atwood provas imiti la stilon de la homa pensofluo, kaj tial ŝia rakontado sinuas tra longaj ĉenoj de subfrazoj, ofte paralelismaj kaj foje eĉ nekompletaj.

Rimarkindaj vortoj kaj frazoj

- ***divides the lawn like a hair parting*** — Por esprimi la dupartigon de hararo pro diskombado, oni proponis: *hardislimo*; *dislimo de hararo*; *hardisigo*; *hardivid(ad)o*; kaj *harapartiga linio*. Ĉiuj sufiĉe klaraj, sed *dislimi* estas aparte alloga pro ĝia zamenhofeco: en PIV troviĝas la ekzemplo “dislimi la harojn^Z”.



La romano *The Handmaid's Tale* unue aperis en 1985. Oni poste adaptis ĝin al filmo (1990), opero (2000), kaj televidserio (daŭranta ekde 2017).

Interese, ĉiuj tradukintoj elektis apartajn radikojn por *divides* and *parting*, ekzemple: *dividas la gazonon kiel dislimo de hararo*. Tute en ordo, sed eble simpligo indas: *dislimas la gazonon kiel hararon*.

- ***Here and there are worms*** — *Here and there* estas kutima anglalingva esprimo sen definitiva ekvivalento en Esperanto. Inter la proponoj estis: *kelkloke*; *jen kaj jen*; *tie kaj tie*; kaj *dise*. Ĉiuj en ordo, sed mi preferas esprimon ofte uzatan de William AULD: *ie-tie*.
- ***Here and there are worms*** — Ĉiuj elektis *vermoj*, ne malĝuste. Sed en la angla, *worm* estas rekta sinonimo por *earthworm*, dum *vermo* en Esperanto kutime havas sencon pli vastan. Do eble pli taŭgas la pli specifaj *tervermoj* aŭ *lumbrikoj*.
- ***the fertility of the soil*** — Preskaŭ ĉiuj elektis *grundo*, kiu ja bone taŭgas, sed plej plaĉas al mi la pli specifa *humo*, kiun proponis DH.
- ***(worms) caught by the sun*** — Multaj elektis *kaptitaj*. PL proponis la elvokivan *surprizitaj*. Kaj BA trafe proponis *trafita*.
- ***flexible and pink, like lips*** — Por *flexible* oni proponis *fleksebla*, *fleksa*, *supla*, kaj *mola*. Aliaj ebloj: *elasta*, *fleksigema*. Por *pink* oni redonis *rozkoloraj* kaj *ruĝeta*. Alia eblo: *roza*.
- ***In the driveway*** — Jen alia afero sen unusola ekvivalento en Esperanto. La proponoj de niaj tradukintoj estis do nesurprize diversaj: *veturejo al la remizo*; *enveturejo*; *aldoma vojo*; *alirvojo*. Alia eblo, el la Wells-vortaro: *alirejo*. Ĉiuj ŝajnas en ordo al mi, almenaŭ unuavide. Sed PIV enhavas strange specifan difinon por *enveturejo*, kiu ne vere konformas al la ĉi-kaze celita ideo: “Pordo, tra kiu la veturiloj povas enveturi en la korton.”
- ***one of the Guardians*** — Preskaŭ ĉiuj redonis *Gardistoj*, sed JJ proponis *Kuratoroj*, kiu estas aparte interesa. Laŭ PIV, la vorto

priskribas homon jure nomitan por zorgi pri persono sen rajtoj – kaj Offred, kiel servistino, ja estas tia persono.

Sed li ne zorgas nur pri Offred. Efektive *Guardian* estas pseŭdo-soldato, kiu gardas potencan viron kaj faras por li diversajn taskojn, ofte banalajn – kiel polurado de lia aŭtomobilo, ekzemple. Do en tiu kunteksto, kiu venas nur per kono de la tuta romano, bedaŭrinde, *Gardisto* ŝajnas pli taŭga.

Kaj jen ekzemplo de fundamenta difekto en niaj mallongaj tradukdefioj: ideale, tradukanto bezonas kuntekston multe pli vastan ol tio, kion mallonga fragmento povas liveri!

- **assigned to our household** — Pluraj elektis *asignita*, kiu eble estas en ordo. La anglalingva *assign* estas vastasenca vorto, uzata por kaj homoj kaj rimedoj, sed en Esperanto, *asigni* kutime rilatas nur al la lasta. (Aliflanke, oni certe povas pensi pri homo kiel nura rimedo.)

Alternative, BA proponis la klaran *komisiita deĵori*, kiu ŝajnas tute bona. DH elektis *postenigita*, kiu koncize esprimas similan ideon kaj donas konvene soldatecan nuancon.

- *assigned to our household* — Pluraj redonis la vorton *domanaro*, kiu ja estas unu valida traduko. Sed *domanaro* nomas loĝantojn, dum *household* estas iom pli vasta. Laŭ la vortaro *New Oxford American*, ĝi efektive prezentas domon kaj ĝiajn loĝantojn kune kiel unuon. Ĉu tia harfenda distingo vere gravas? Eble ne, sed PL kaj BA ŝajne provis kapti la originalan ideon per *nia domo* kaj *ĉe ni*, respektive.
- *[The car] is long and sleek* — *Sleek* estas plursignifa vorto, kaj la proponoj spegulis tion: *glata, glacea, polurita*, kaj eble plej taŭge, *eleganta*. Tiel la vortaro *Merriam-Webster* efektive difinas *sleek* en rilato al aŭtoj: “having trim, graceful lines”.
- *He has a cigarette stuck in the corner of his mouth* — Diversmaniere la tradukintoj esprimis tiun ideon. Kelkaj redonis la anglalingvan frazstrukturon laŭvorte: *Li havas*

cigaredon (ŝovitan en / pikita en / alkroĉitan al) la buŝangulo. Kaj kelkaj elektis aliajn verbojn kaj rearanĝis la frazon: *Li tenas cigaredon ĉe la flanko de la buŝo*; *Cigaredo elstaras de la angulo de la buŝo*.

DH tre koncize proponis: *Cigaredo fiksitas enbuŝangule*. Bedaŭrinde la *itas*-verbformo (mallongigo de *estas X-ita*) **estas nekutima** <<https://bit.ly/3XEDtuW>>, kaj pro tio mi hezitus uzi ĝin. Tamen la pli longa formo de la proponita solvo ŝajnas al mi tre taŭga: *Cigaredo estas fiksita ĉe lia buŝangulo*.

- *he hasn't been issued a woman* — Kiel jam dirite, *asigni* kutime ne rilatas al homoj, sed Atwood elektis intence senhoman verbon por montri la senpovecon de virinoj en tiu malutopio. Pro tio, verŝajne, pluraj el niaj tradukintoj preferis *asignis*. Aliaj proponoj estis (*dis*)*donis* kaj *disponigis*.
- *he doesn't rate* — *ne estis inda*; *ne rangas*; *ne estas estimata*; *ne gravas*; *merito mankas al li*; *ne posedas la postulatajn kondiĉojn*. Aliaj ebloj: *senprestiĝa*, *senmerita* (En la *Dua Libro*, Zamenhof diris: “[M]i estas tute senmerita kaj ne konata en la mondo.”)
- *he acts as if he doesn't know this, or care* — Pluraj el la tradukintoj redonis la frazon pli-malpli laŭvorte kun du verboj, ekzemple: *li agas kvazaŭ li ne scias tion, aŭ ne zorgas*. Alia eblo, malpli preciza sed pli glata: *li ŝajnas senscia pri tio, aŭ indiferenta*.
- *he's not servile enough* — La proponoj estis: *servema*, *servila*, *servanteca*, *sklaveca*, kaj *lakea*. Alia eblo: *servuta*.
- *black market* — Kelkaj helpe klarigis la idiomaĵon, redonante *kaŝkomerco* kaj *neleĝa komercado*. Sed *nigra merkato* estas konata esprimo en Esperanto: PIV mencias ĝin en la kvina difino de *nigr/a* <https://vortaro.net/#nigra_kd>.
- *Smells fishy, as they used to say; or I smell a rat* — Kontraste, jen du metaforoj ne bone konataj en Esperanto. Cetere, frazo iom poste denove aludas al ambaŭ, do ne eblas facile

anstataŭigi ilin. Niaj tradukintoj do elektis redoni ilin laŭvorte. Kelkaj tamen enkondukis per klarigo, kiel ekzemple en la propono de BA: *Mi sentas ke io ne estas en ordo. Mi pensas pri malnova esprimo, "flari fiŝ-odoron" ...*

- *I think of how he might smell ... tanned skin **filmed with smoke*** — Estas malfacile elekti inter la diversaj proponoj pri la fumodoro. Evidente Offred trovas la viron alloga kaj dezirinda, do mi iom hezitas pri *sorbigita de fumo*, kiu ŝajne implicas odoron tro fortan por esti frandinda. Ankaŭ *kovrita per fumo* estas en ordo, kvankam la verbo impresas iom seke, dum la originala *filmed* ŝajnas sensama, eĉ volupta. *Tuŝetita de fumo* (BS) eble redonas iom de originala impresio. Alia eblo tia: *fumtuŝita*.
- *I sigh, inhaling*. — La ideo ŝajnas sufiĉe memevidenta: Offred enspiras, imagante la aromon, kaj poste ŝi suspiras pro bedaŭro. Tamen la gramatika samtempeco de la du agoj prezentas paradokson se ni tradukas la frazon tro laŭvorte, ĉar per *sigh* oni ne **enspiras**, sed **elspiras**. Same en Esperanto: **suspiro** <https://vortaro.net/#suspiro_kd> estas nepre elspira fenomeno.

PL evitis la kaptilon per simpla ellaso de la enspirado: *Mi suspiras pro la nura imagado*. Bone. Sed la imagita flarado estas elvoka, kaj tial eble konservinda.

Kelkaj tradukis laŭvorte, konservante kaj la enspiron kaj la paradokson: *Mi suspiras, enspirante*. (Kaj kelkaj proponis *inhal/i*, sed atentu: tiu radikulo estas falsa amiko, kiu redonas nur la porkuracan signifon de *inhale*. Ekzemple: "La astmulo baraktis enspiri, do li prenis inhalilon el la poŝo kaj haste inhalis du dozojn da medikamento.")

Ĉu ni interpretu la originalon kiel implican sinsekvon? Do: (*After inhaling, I sigh?* BA priskribis la du agojn per simplaj verbformoj sen participo: *Mi suspiras, kaj enspiras*. Ankaŭ mi preferas imagi, ke unu ago sekvas la alian, sed en inversa ordo, do ekzemple:

Enspirante, mi suspiras aŭ simile.

La sinteza traduko

Jen la kutima provo konstrui solvon uzante la diversajn proponojn de niaj tradukintoj (kun ankaŭ kelkaj arbitraj aldonoj). Kiel ĉiam, ne temas pri definitiva solvo – ĉar tiaj solvoj ne ekzistas en tradukado! – sed pri elektoj laŭ propra gusto.

Por tiuj, kiuj volas vidi ĉiujn proponojn kaj kompari ilin detale, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de ĉio.

Mi piediras laŭ la gruzo pado, kiu dislimas la malantaŭan gazonon bonorde, kiel hararon. Pluvis pasintnokte; la herbo ambaŭflanke estas malseketa, la aero humida. Ie-tie kuŝas lumbrikoj, atestaĵoj pri la fekundeco de la humo, trafitaj de la suno, duonmortintaj, molaj kaj rozaj kiel lipoj.

Mi malfermas la blankan pordon en la palisaro kaj pluiras, preter la gazonoj antaŭ la domo, al la pordo en la antaŭa barilo. Sur la aldoma vojeto, unu el la Gardantoj postenigitaj al ni lavas la aŭton.

Ĝi estas multekosta aŭto, Kirlovento; pli bona ol la Ĉaro, multe pli bona ol la dika, praktika Behemoto. Kompreneble ĝi estas nigra, la koloro de prestiĝo aŭ ĉerkveturilo, kaj longa kaj eleganta. La ŝoforo elpoluras ĝin per ŝamo, ameme. Almenaŭ tio ne ŝanĝiĝis: la maniero, laŭ kiu viroj karesas bonajn aŭtojn.

Li portas uniformon de la Gardantoj, sed la ĉapo kliniĝas gaje, kaj la manikoj estas falditaj ĝis la kubutoj. Videblas liaj antaŭbrakoj, sunbrunigitaj sed punktitaj de malhelaj haroj. De lia buŝangulo pendas cigaredo, montrante ke ankaŭ li havas ion por interŝanĝi en la nigra merkato.

Li loĝas ĉi tie en la domo, super la remizo. Malaltrungulo: oni ankoraŭ ne asignis al li virinon, eĉ ne unu. Li estas senmerita pro ia difekto, iu manko de influaj konatoj. Tamen li ŝajnas senscia pri tio, aŭ indifera. Li estas tro senĝena, ne sufiĉe servuta. Eble pro stulteco, sed mi pensas ke ne. Fetoras fiŝe, kiel oni kutimis iam diri pri afero suspektinda; aŭ, "Mi flaras raton." Netaŭgeco kiel odoro. Malgraŭvole mi provas imagi, kiel li odoras.

Ne je fiŝo aŭ putra rato, sed je brunigita haŭto, iom ŝvita pro la suno, fumtuŝita. Enflarinte, mi suspiras.



La nova defio

Por resti ĉe la temo de popularaj rakontoj el la 20-a jarcento ĵus adaptitaj al televido, mi proponas la jenan el la sciencfikcia (kaj historia) romano **Kindred** <[https://en.wikipedia.org/wiki/Kindred_\(novel\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Kindred_(novel))> de Octavia E. BUTLER. Unue aperinte en 1979, ĝi prezentas rakonton de nigra virino el Kalifornio en 1976 subite kaj senvole transportita al plantejo en 19-a-jarcenta Marilando – kaj reen, plurfoje. Kerna temo de la rakonto estas sklaveco, ĉar en tiu marilanda plantejo ŝi renkontas du el siaj pragepatroj: sklavigitan nigrulinon, kaj la blankulon, kiu posedas ŝin.

La jena fragmento venas el ĉapitro titolita *The Fall*, kaj priskribas la vivon de la ĉefrolulo en 1976:

I was working out of a casual labor agency—we regulars called it a slave market. Actually, it was just the opposite of slavery. The people who ran it couldn't have cared less whether or not you showed up to do the work they offered. They always had more job hunters than jobs anyway. If you wanted them to think about using you, you went to their office around six in the morning, signed in, and sat down to wait. Waiting with you

were winos trying to work themselves into a few more bottles, poor women with children trying to supplement their welfare checks, kids trying to get a first job, older people who'd lost one job too many, and usually a poor crazy old street lady who talked to herself constantly and who wasn't going to be hired no matter what because she only wore one shoe.

You sat and sat until the dispatcher either sent you out on a job or sent you home. Home meant no money. Put another potato in the oven. Or in desperation, sell some blood at one of the store fronts down the street from the agency. I had only done that once.

Getting sent out meant the minimum wage—minus Uncle Sam's share—for as many hours as you were needed. You swept floors, stuffed envelopes, took inventory, washed dishes, sorted potato chips (really!), cleaned toilets, marked prices on merchandise ... you did whatever you were sent out to do. It was nearly always mindless work, and as far as most employers were concerned, it was done by mindless people. Nonpeople rented for a few hours, a few days, a few weeks. It didn't matter.

La redakcio (trovu ĝian adreson en la kolofono) akceptos vian proponon **ĝis la 15-a de Septembro**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ ne volas. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu proponon**, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

esti

senintenca esperantaĵo • Timothy BORONCZYK



Ĉu esti aŭ ne esti, – tiel staras nun la demando. Kaj la respondo, ŝajne, estas «avokado».

Mikronoveloj

Por nia mikronovelo-rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Herooj ne ĉiam portas mantelon

Li staras apud ekspozicio de viro-ĉemizoj atendante, ke la vendisto atentu lin. “Kiel malfacile povas esti rimarki min?” li scivolas. Ĝuste tiam, iu rimarkas.



“Panjo, rigardu! Jen Arnold Schwarzenegger!”

Li ĝemas mallaŭte kaj turniĝas al la parolanto. “Mi revenos,” li diras, kun la aŭstra parolmaniero konvena en tiaj okazoj.

La erara misidentigado iom ĉagrenas lin, kiel kutime. Ĉu neniu rekonas lin? Sed kiel kolera oni povas esti kontraŭ knabeto portanta – li hazarde konstatas per X-radi-vidado – kalsonon ornamitan per bildoj de dinosaŭroj?

Ridetante, li returniĝas al la vendisto, kiu finfine pretas helpi.

“Ĉu vi havas mantelojn?” li demandas. “Mi bezonas ruĝan.”

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

... sed preskaŭ ĉiam

De apuda vendotablo, viro rigardis la aferon. Li pensis: “Kompatinda Superhomo. Eĉ sen okulvitroj, neniu plu rekonas lin. Oni ja ankoraŭ rekonas min ... sed pro mia kaŝrolo kiel okulisto, mi povas min kaŝi senokulvitre.”



Li senkonscie prenis siajn tromp-okulvitrojn el veŝtopoŝo, poluris ilin, kaj surmetis ilin por kontroli la rezulton.

“Panjo, rigardu! Estas li! Jen!” Alia bubo.

“Ĉu Superhomo?”

“Ne, LI! Sinjoro Za–”

Ludoviko rapide demetis la okulvitrojn. La knabo perpleksiĝis. “Mi ĵuras, Panjo, li estis ĝuste tie! Malantaŭ tiu oldulo. Mi vidis li!”

Ĝentilhomo ĉiam, Ludoviko eliris kun sia verda mantelo en sako, dirinte nenion pri la forgesita akuzativo.

— Benson SMITH <uosuaq@gmail.com>

La Morto

La Morto persekutas ŝin. Ŝi vidis lin unufoje antaŭ semajno, ĉe entombigo, kaj ekde tiam multfoje. Nun li staras transstrate, ekster ŝia loĝdomo, kvazaŭ gardante la aliron.



Teruro frapas ŝian koron, sed ŝi decidis provi ŝteliri preter lin por eniri la konstruaĵon. Endome, eble ŝi estos sekura.


Rigardante lin okulangule, ŝi paŝas de la trotuaro en la straton, kaj aŭtobuso numero 2 tuj trafas ŝin, mortige.

Transstrate, la palvizaĝa maldikulo fortiras dekape kapuĉon de nigra pluvmantelo. “Mil diabloj!” li diras. “Ne denove.” Jam tri fojojn ĉi-monate li vidis iun tiamaniere paŝi en trafikon. Vere, li pensas, persekutas min la Morto!

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Malaperis la Ilanopriloj

Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis juna, Ilanopriloj vivis en nia regiono. Oni renkontis ilin en la ĝardenoj, kampoj kaj arbaroj. Ili ne estis danĝeraj, kaj foje alproksimiĝis por tuŝo aŭ kareso.



Sed venis tempo kiam okazis sport-ĉasado (tiel ŝajnis al mi), kaj iom post iom la llanopriiloj estis mortigitaj. Mi neniam forgesos la kriojn kaj ĝemojn. Iun tagon mi trovis la korpon de juna llanopriilo kiu foje vizitis min en la ĝardeno.

Nun ili ne plu ekzistas ĉi tie. Nur restas ni, la sciuroj, kunikloj, birdoj, kaj sovaĝiĝintaj katoj kaj hundoj. Mi forte sentas la perdon de la dupieduloj.

— Lee MILLER <licxjo@gmail.com>

La vendota dometo

Sidante surportike kun sia edzino, Vilĉjo mansalutas preterpromenanton.

“Kiu estas tiu?” ŝi demandas.

“Mi forgesis mencii! Li kaj lia edzino estas niaj novaj najbaroj.” Li esprime levas la brovojn.

“Interese,” ŝi diras, scipline kapklinante.

Ili ofte parolas pri la temo. La apuda dometo estas ideala unua hejmo por junaj geedzoj, sed jam delonge, ĉiu paro tie enloĝiĝinta eksedziĝas ene de jaro. Ĝi estas kiel komerca loko, kie firmaoj neniam sukcesas. Eble la domo estas malbenita.

“Li revenas,” ŝi flustras.

Vilĉjo, kiu ĉiam emas esti amika, ekkrias, “Mi vidis vian edzinon enurbe hieraŭ nokte! Ĉu li estis via frato, ŝia kunulo?”

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Kolofono

Redaktoro/Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin ĉe <bulteno@esperanto-usa.org> aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ Esperanto-USA.

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

Kontribuontoj bonvolu legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en la reta kolofono. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon laŭ la supra permesilo.

Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a portrait photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We’ll return materials sent by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or Esperanto-USA.

Materials appearing in *Usona Esperantisto* are made freely available and redistributable under the Creative Commons license CC BY-SA 4.0. As a courtesy, however, we ask readers to wait two months before republishing the latest content.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide in the online colophon. By sending materials to *Usona Esperantisto*, you grant to Esperanto-USA nonexclusive rights to edit and publish the materials under the above license. Authors however retain copyright for their works and thus may reuse, republish, or sell the unedited originals as they wish, without any need for attribution to *Usona Esperantisto*.